

Ruslando:

Blasfemoj kaj bomboj kontraŭ bela artfilmo

Pri la reagoj de rusaj moralistoj kaj caristoj al la filmo „Matilda“ de Aleksej Uĉitel

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)

„Matilda“ estas bela rusa filmo kun imponaj bildoj, kun multe da pompo kaj lukso, oro, kostumoj, uniformoj kaj ravaj romantikaj scenoj. Temas pri la historio de la juna carido Nikolaj Aleksandroviĉ Romanov, kiu devos fariĝi nova imperiestro post la morto de caro Aleksandro IIIa. Sed al li ankoraŭ mankas plaĉa virino. Kvankam en 1884 Nikolao konatiĝis kun la germana princino Aleksandra Hessen-Darmstadt, kiu estis lia kuzino duagrada kaj antaŭvidita kiel lia edzino, la carido dume amis alian virinon: la junan pol-rusan dancistinon Matilda Kŝesinskaja.¹

Kial ĉi tiu filmo estas interesa? La filmo provokis en Ruslando neimageble grandan ŝtormon de kritikoj, skandaloj, protestoj, blasfemoj kaj minacoj, precipe flanke de diversaj konservativaj, radikalaj kaj ekleziaj moralapostoloj, naciismaj historiistoj kaj carismaj apologetoj, kiuj vidis en tiu filmo herezon, sakrilegion, misfamigon de la caro kaj ofendon de la sentoj de kredantoj.

Historia fono

La biografio de Nikolao IIa estas ĝenerale sufiĉe konata.² Sed kiu estis tiu Matilda Kŝesinskaja? Ŝi estis dancistino de „imperiestraj“ baletoj kaj operoj de pola origino (pro kio ŝi nomiĝis Matylda Maria Krzesińska), kiu estis tre ŝatata ne nur de la tiama rusa publiko, sed ankaŭ de la cara familio mem, kiu fariĝis atentema pri ŝi. Eĉ tri viroj el la romanova familio rivalis por ricevi la favoron de Kŝesinskaja: krom Nikolaj Aleksandroviĉ Romanov mem, la posteulo sur la rusa trono, pri kiu temas en la filmo, ankaŭ grandprinco Sergej Miĥajloviĉ Romanov kaj ties kuzo grandprinco Andrej Vladimiroviĉ Romanov,³ kun fatalaj konsekvencoj.

Nikolao Romanov konatiĝis kun Matilda Kŝesinskaja en la jaro 1890, pli precize la 23an de marto okaze de solena festo de la Imperiestra Teatra Lernejo, kiam la dancistino finis ĉi-lernejon. Naskita en 1872, Matilda estis apenaŭ 18-jara, kiam ŝi konatiĝis kun Nikolao, kiu mem estis preskaŭ 22-jaraĝa. La cara familio ĉeestis ĉi tiun solenaĵon. En la filmo Matilda estas prezentita al Aleksandro IIIa, kiu sidas en rulseĝo, en akompano de Nikolao. Laŭ la legendo, kiun rakontis Robert Masie, usona historiisto, kiu studis la dinastion Romanov, Matilda serĉis dum tiu okazaĵo la kontakton kun la carido, celante veki la impreson, ke ŝi trovis lin kvazaŭ hazarde. Ĉi tiu incidento iĝis kialo por daŭrigi la rilaton. Dum la somera teatra sezono en Krasnoe Selo Matilda fakte sukcesis ricevi la atenton de la carido, al kiu la dancistino faris „pozitivan, plaĉan“ impreson, kiel Nikolao notis en sia taglibro. El la flirto inter Nikolao kaj la koketa dancistino fariĝis arda pasio kaj verŝajne ne nur platona amo. Ksenija, la fratino de Matilda, nomis la caridon ŝia „amiko“. En somero 1892 Nikolao denove renkontiĝis kun Matilda, kiu konfirmis en siaj memuaroj siajn tiamajn sentojn por la carido, al kiu Matilda evidente vere plaĉis, precipe ŝia dancado. Ŝi estis la unua, kiu kapablis ripeti la sensaciajn 32 sinsekvajn turniĝojn de la klasika baletoj, nomatajn „32 fouettés en tournant“, kiujn plenumis nur la itala dancistino Pierina Legnani (1863-1923). En postaj notoj Nikolao parolis pri enamiĝo, dum Matilda konfirmis la komunan amon, kvankam ŝi ne certis pri liaj veraj sentoj. Ambaŭ amantoj revidadis sin dum baletaj prezentoj kaj probable ankaŭ poste, private. La 25an de januaro 1893 Nikolao skribis, ke li „pasigis la plej bonan vesperon kun ŝi“. La renkontiĝoj de la paro plioftiĝis, tiel ke la rilato fariĝis vaste konata ĉe la publiko

¹ Ruslingve Матильда Кшесинская, k.a. (internacia latina transliterumo: Matil'da Kŝesinskaja). Anstataŭ ĉ kaj ŝ estas uzataj ĉ kaj ŝ.

² Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_II._\(Russland\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_II._(Russland)).

³ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Sergei_Michailowitsch_Romanow, https://de.wikipedia.org/wiki/Andrei_Wladimirowitsch_Romanow.

en Peterburgo. Princino Alix, al kiu tiu rilato tute ne plaĉis, kondukis nerveze, ĝis kiam la afero fariĝis klara. En la filmo tiu konflikto estas rimarkeble emfazata. Ekster tiuj magraj memuaraj kaj taglibraj informoj oni povas lasi al la fantazio de verkistoj kaj reĝisoroj imagi la reston, por elpensi kion ili volas por siaj artverkoj, sendepende de la demando, ĉu Nikolao amaris kun Matilda en la lito aŭ ne. Konstantin Severnard, historiisto kaj rusia eksparlamentano, kiu konsideras sin pranepo de Kŝesinskaja, estas konvinkita, ke ĉe ili eĉ naskiĝis filino, kiu ricevis la nomon Celina. Oficiale, Celina (1911-59) estis la filino de Iosif Kŝesinskij (1868-1942), kiu same estis fama balet-dancisto kaj majstro de la Mariinskij-kaj Kirov-teatroj, merita artisto de RSFSR (1927). Severnard diris, ke li povas pruvi sian aserton per foto(j).

Post kiam la 8an de aprilo 1894 Alix konsentis fianĉiĝi en Coburg kaj anoncis, ke ŝi pretas edziniĝi al Nikolao, konvertiĝi al la ortodoksa kredo kaj adopti la nomon Aleksandra Fjodorovna, la carido ĉesis la rilatojn kun Matilda, kiu eksciis tiun decidon de la paro en la gazetaro. Sekve, ĉi-koncernaj notoj finiĝis en la taglibro de Nikolao, Laŭ onidiroj, la kontakto kun Matilda tamen ne ĉesis, sed estis daŭrigita, pri kio atestis la memuaroj de aliaj samtempanoj.

La neatendita morto de Aleksandro IIIa en la 1a de novembro 1894 faris rapidan geedziĝon de la carido necesa, pro kio la nupto, kiu estis planita por la jaro 1895, okazis jam la 26an de novembro 1894. La cara kronado de la paro estis aranĝita en majo 1896 en Moskvo.

Ĉiukaze, la „amo“ inter Nikolao kaj Matilda ege helpis ŝian profesion karieron: Kŝesinskaja fariĝis ĉefdancistino (de 1896) en baletoj kaj operoj de la Mariinskij-teatro de Sankt-Peterburgo kun la titolo „Merita artistino de la Imperiestraj Teatroj“, kio estis nekutima atingo por ŝi. La forta pozicio de Kŝesinskaja, kiu ĝuis la statuson de kult(ur)a stelulino, kaŭzis, ke ŝi mem povis ordoni sian volon al la teatra direktoro, kaj la homoj faris, kion ŝi deziris.

Private, Matilda estis ´transdonita´ al la manoj de grandprinco Sergej Miĥajloviĉ, nepo de caro Nikolao Ia kaj onklo de Nikolao IIa. Iusence Matilda do apartenis al la cara familio. Sed en 1900 aperis grandprinco Andrej Vladimiroviĉ, nepo de caro Aleksandro IIa, kiu estis sep jarojn pli juna ol Matilda kaj interesiĝis pri ŝi. Kiam en 1902 Matilda naskis la filon Vladimir, ambaŭ viroj kverelis pri la patreco. Andreo formale agnoskis la infanon, sed kiu estis la vera patro restis ĝis nun malklare. Ambaŭ amantoj regaladis la virinon per multekostaj juveloj de Fabergé kaj Cartier. Dum Andreo aĉetis por Matilda domon en Francio, Sergeo donacis al ŝi daĉon en Strelna, kie okazis grandiozaj festoj. En 1904 la dancistino eĉ ricevis propran vilaon en Sankt-Peterburgo, kiu estis pagita de Sergeo (kaj kiu poste fariĝis muzeo pri historio de Ruslando). La instalaĵoj estis importitaj el Francio. En ĝia salono ofte gastis caro Nikolao IIa kaj diversaj grandprincoj. La fabela riĉeco de la balerino⁴ vekis envion, ĵaluzon, kaŭzis diversajn absurdajn onidirojn kaj kreis malamikojn. Matilda fariĝis objekto de legendoj pri konspiro kaj korupto. Iuj eĉ vidis en sia vivstilo la kulpon por la perdita milito de Ruslando kontraŭ Japanio. La pompa vivo de Kŝesinskaja aprubte finiĝis en la revolucia jaro 1917. Post februaro (marto) ŝia vilao de estis konfiskita kaj ekspropriata, kaj la bolŝevikoj instalas sian ĉefkomandon en ĝi. Post la reveno de Lenin al Ruslando en aprilo li prezentis sian unuan publikan paroladon sur la balkono de la vilao. Sed Kŝesinskaja ne akceptis tion kaj plendis antaŭ la tribunalo. Kvankam la juĝistoj pravigis ŝian plendon, en la konfuzo de la revoluciaj tumultoj neniu vere interesiĝis pri tiaj juĝoj kaj la interesoj de la dancistino. En somero Matilda forlasis Petrogradon, iris al Kislovodsk, kie troviĝis Andreo, kaj en 1919 daŭrigis al Novorosijsk, de kie la postan jaron ŝi migris kun Andreo kaj filo Vladimir al Francio. En Cannes la paro geedziĝis. Kvankam Kŝesinskaja ne havis la rajton porti la titolon de princino, la familio Romanov tamen poste donis ĝin al ŝi. En 1926 la „caro“ en la ekzilo Kiril Vladimiroviĉ Romanov (1876-1938) havigis al ŝi la titolon „princino Kraŝinska“ kaj kelkajn jarojn poste (en 1935) ŝi eĉ ricevis la rangon de „princina moŝto Romanovska-Krasinska“. La maljuniĝanta belulino, kiu ŝatis la modernan modon, vivis de la vendado de juveloj kaj fondis sukcesan baletan lernejon en Parizo (1929), kie famaj lernantoj estis instruataj. En 1936 Kŝesinskaja publike elpaŝis la plej lastan fojon en Londono. En 1960 ŝi publikigis siajn memuarojn. Sergeo, kiu siatempe volis edziĝi al Matilda, kiu rifuzis la proponon, estis mortigita de la bolŝevikoj en Ruslando. La balerino forpasis, 99-jara, la 6an de decembro 1971 en Parizo,

⁴ La termino, kiu ne ekzistas en PIV, signifas (ĉef-)dancistinon en baletoj.

kie ŝi estis enterigita en la tombejo Sainte-Geneviève-des-Bois en la sama tombo, en kiu kuŝas ankaŭ ŝiaj edzo kaj filo, kiuj forpasis en 1956 kaj 1974.

La historiaj faktoj do estas pli malpli konataj. Reĝisoro Aleksej Uĉitel⁵ estas konvinkita, ke Kŝesinskaja ne elpensis sian romanon kun Nikolao, kiu ŝajne eĉ pretis rezigni pri la trono pro tiu amo. La altgrade profesie produktita filmo ricevis la karakteron de melodramo kun erotike aluditaj scenoj. Oni vidas la nudan bruston de Kŝesinskaja, la erotike ekscititan caridon Nikolao en la teatro, amoradon en la lito, ĵaluzajn reagojn de Alix, kaj ĉion ceteran, kio devas aparteni al tia filmo, por ke ĝi fariĝu interesa kaj spektinda. Sendube, reĝisoro Aleksej Uĉitel plene regas tiun arton kaj sukcesis majstri ĉiujn defiojn. La filmo fariĝis artaĵo parte eble kun iom kiĉa fasado, sed kiel spektanto oni ĉiukaze raviĝas, ensorĉiĝas, fasciniĝas.

La aktoroj

La rolon de carido Nikolao ludas Lars Eidinger (nask. 1976), konata germana teatra kaj multflanka filmaktoro, kiu en la Borowski-Tatort ludas la murdiston de virinoj. Du jarojn Uĉitel serĉis la taŭgan kandidaton por tiu rolo, kiun li povis okupi per tiu Eidinger, post kiam la reĝisoro vidis lin ludi Hamleton en Moskvo. En la rolo de Matilda Kŝesinskaja brilas la bela pola aktorino Michalina Olszańska (nask. 1992). La rolon de Alix transprenis Luise Wolfram, kiu same kiel Eidinger fariĝis konata pro kunludado en la germana televida serio Tatort (bremena). Eĉ la interreta novaĵorgano *Ruslando hodiaŭ* konfesis, ke tiu aktorino ludas sian rolon kiel digna kaj profunde pia kredantino.

Protestoj, blasfemoj kaj minacoj

Sed ne ĉiuj homoj en Ruslando fasciniĝis aŭ raviĝis pri la filmo de Uĉitel pri Nikolao kaj Matilda. Kontraŭstaro kaj protesto rezonadis precipe el konservativaj, naciismaj, religiaj kaj ekleziaj cirkloj. Laŭ la opinio de tiuj homoj la filmo ofendas la dignon de tiu caro, kiu estis sanktigita antaŭ 17 jaroj de la rus-ortodoksa eklezio kiel martiro. Kun Lenin, Stalin kaj Putin Nikolao fariĝis la plej populara, plej admirata kaj plej estimata figuro en Ruslando.

En la histeria ĥoro de la opozicio kontraŭ la filmo de Uĉitel kunkantis unuavice la rus-ortodoksa eklezio mem. Patriarko Kirilo Ia (V.M. Gundjaev)⁶ persone kritikis la filmon, kiu laŭ lia opinio sekvas „mensogan dramaturgion“, falsante la historiajn faktojn. Ŝajnas, ke la ekleziuloj tute ne eltenas artan filmon, en kiu oni vidas la sanktan caron kun pola dancistino amori en la lito. Ankaŭ episkopo Tiĥon (G.A. Ŝevkunov),⁷ konata proparolanto de la rus-ortodoksa eklezio, influa eklezia kaj ŝtata kultur-funkciulo kaj konsilanto, proksimulo de Putin kaj mem profesia reĝisoro de (tendencismaj) historiaj dokumentaj filmoj, en kiu Bizanco estas glorata kaj la Okcidento kritikata, diris en gazetara konferenco ĉe la Ruslanda Milit-Historia Societo, ke la filmo „Matilda“ ne konformas al la historia vero, kvankam li almenaŭ devis konfesi, ke inter Nikolao kaj Matilda ekzistis forta amrilato, pro kiu la carido kaj posta caro multe suferis psike. Nu, kiel dirite, tiu epizodo estis siatempe ĝenerale konata afero en Peterburgo kaj do nenio nova. La klera kaj elokvente parolanta episkopo, kiu cetere rifuzis funkcii kiel konsilanto de la filmo, trovas la enlitajn kaj kisajn scenojn, kiujn sugestis jam la reklamcela amtaŭfilmeto (trejlero), neakcepteblaj (r. bezobrazie), ĉar por li ili signifas „blasfemon (r. rugatel'stvo) kontraŭ nia historio kaj kulturo“. Reĝisoro Uĉitel estas por li simpla mensoganto. Tamen, li almenaŭ agnoskis la liberecon de la arto. Malpermesi aŭ cenzuri la filmon havus neniun sencon, ĉar la filmo ĉiukaze iam aperos en la interreto. Pavel, ĉefepiskopo de Surgut, tamburis per plena kondamno de la filmo kiel „intence kontraŭhistoria (...) mensogaĵo kun la celo diskrediti la bildon de Nikolao IIa“, kaj Ilarion Alfejev, ĉefepiskopo de Volokolamsk, pritaksis la strion „apoteozo“ (diigo) de la „senmorala krudeco“ (aŭ simile, r. pošlost'), ĉar la dancistino montras sian mamon. Nu, almenaŭ Kliment, ĉefepiskopo de Kaluga, komprenis, ke la skandala diskuto ĉirkaŭ la filmo, precipe la propono malpermesi ĝin, nur kondukis al la plialtigo de la interesiĝo pri ĝi, kion konfirmas la disponeblaj ciferoj. Por kontraŭbatali tiajn filmojn

⁵ Ruslingve Учитель (internacia latina transliterumo Uĉitel').

⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Kyryll_I.

⁷ Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Tichon_\(Schewkunow\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Tichon_(Schewkunow)), <http://www.patriarchia.ru/db/text/60784.html>, <https://www.youtube.com/watch?v=TIHWnvk2Q4g>.

plej utilas la eldonado de produktaĵoj, kiuj prezentas la historion el la vidpunkto de la ortodoksa eklezio. Do, la rusa eklezio iusence esprimis la „fatvon“ pri la verko de Uĉitel kaj Eidinger, kun kiu ili devas vivi.⁸ Similan opinionon kiel la eklezio reprezentas la oficejo de la dinastio Romanov; reprezentanto Aleksandr Zakatov nomis la filmon „grandparte sakrilegio“. La caristoj kaj monarkiistoj ĉiam neis la ekziston de intima (diru: seksa) rilato inter Nikolao IIa kaj Matilda Kŝesinskaja.

Ne nur flanke de la rus-ortodoksa eklezio Uĉitel ricevis akran kritikon, sed de iuj obskuraj organizaĵoj de la „civila socio“ venis eĉ perfortaj minacoj. Aparte agreseme manifestiĝis la grupo „Kristana ŝtato – Sankta Rusio“, kiu elpaŝis en januaro 2017. Laŭ la opinio de la anoj de tiu grupo, la filmo de Uĉitel prezentas la caron en „maltaŭga maniero“, kio signifas „provokon kontraŭ la rusa ŝtato, kio nur utilas al la malamikoj de Ruslando“. La organizaĵo, kiu ne estas oficiale registrita en Ruslando, celas restarigi la absolutisman monarkion en Ruslando kaj apogas prezidenton Putin, kiun oni konsideras sola garantianto de la konservado de la rusa ŝtateco. Laŭ propraj indikoj, ĝiaj membroj, ĉirkaŭ 350, kiuj aktivis en ĉiuj regionoj de Ruslando, pretas doni sian vivon por tiu celo. Por emfazi sian abomenon pri la filmo, la ĉefaj protagonistoj de la „Kristana ŝtato – Sankta Rusio“, Aleksandr Kalinin (fondinto) kaj Miron Kravĉenko (gazetara sekretario), ne hezitis sendi „Malferman leteron“ al la Kineja Unuiĝo, kiu enhavis la senkrupulan minacon, ke „oni bruligos la kinejojn de Ruslando, se la filmo ‘Matilda’ estos montrata, kaj povas esti, ke ankaŭ homoj suferos“. Kalinin kaj Kravĉenko konsideras ĉiun reklamon aŭ afiŝon pri la filmo kaj ĉiujn ŝtatajn organojn, kiuj licencigas ĝin por montrado en kinejoj, kiel deziron humiligi la sanktulojn de la ortodoksa eklezio kaj kiel alvokon al milita scenaro laŭ la ukraina Majdano. Multaj kinejoj efektive estis timigitaj de la minaco de Kalinin kaj pro kaŭzoj de la sekureco rezignis pri la montrado de la filmo.

Nature, reĝisoro Uĉitel tute ne povis toleri tiajn farojn kaj siaflanke sendis plendon al la ĝenerala prokuroro de Ruslando kun la peto protekti la kolektivon de la filmo „Matilda“ de la minacoj de tiu organizaĵo. Samtempe, la advokato de Uĉitel, Konstantin Dobrynin, sendis al la „Ĉefa administracio por la kontraŭbatalo de la ekstremismo“ ĉe la Ministerio de la internaj aferoj leteron kun la peto esplori la aktivecon de la menciita organizaĵo.

La polico vizitis la studion de Uĉitel por kontrolo. Nekonataj anonimaj personoj eĉ jetis eksplodaĵojn kontraŭ la studio de Uĉitel kaj provis eksplodigi iun kinejon en Jekaterinburgo. La 20an de septembro 2017 Kalinin estis arestita lige kun la bruligo de aŭtomobilo en la proksimeco de la oficejo de la advokato de Uĉitel.

Kontraŭ la montrado de la filmo „Matilda“ de Aleksej Uĉitel en la kinejoj de Ruslando batalas ankaŭ la „movado Sorok sorokov“ (DSS), kiu estis oficiale fondita la 1an de junio 2013 kaj estas tamen malpli radikala ol la „Kristana ŝtato“ de Kalinin. Laŭ klarigo de ĝia fondinto, Andrej Kormuĥin, la organizaĵo estis fondita por kontraŭstari la „krizon de la konscio, kiu kaŭzis la konscion pri la ortodokseco kiel io periferia en la vivo de la lando“. Inter ĝiaj ĉefaj celoj kaj taskoj estas nomitaj la defendo de la konstruado de ortodoksaj preĝejoj, humanitara helpo al suferantoj en Donbaso, socia laboro kun infanaj hejmoj, senhejmuloj kaj malliberuloj, organizado de sportaj eventoj. DSS nombras dekmilon da membroj, inter kiuj troviĝas multaj konataj sportistoj. Vastan popularecon la organizaĵo ricevis lige kun sia agado sur la teritorio de la preĝejo Voskresenie Ĥristova en Kadaŝi, Moskvo, kie kolektiĝis ĉirkaŭ mil homoj, kaj lige kun sia „preĝado starante“ kontraŭ la filmo en aŭgusto 2017. En septembro tiaj aktivecoj ripetiĝis krom en Moskvo ankaŭ en Sankt-Peterburgo, Volgogrado kaj aliaj urboj de Ruslando. Ŝajnas, ke DSS tamen ne celas tute malpermesi la filmon, sed opinias, ke estus bone, se „nur malmultaj homoj vidus la provokaĵon“. La ŝtaton oni avertis, ke estonte ĝi estu pli singarda, elektante la projektojn, kiujn ĝi financas. Kvankam en la organizaĵo de Kormuĥin ekzistas ankaŭ membroj, kiuj tendencas al perforto, kiel iuj kritikistoj rimarkis, la gvidanto kondamnis la metodojn, kiujn aplikas la „Kristana ŝtato“, ĉar la movado „Sorok sorokov“ volas esti konsiderata kiel serioza

⁸ Ke en Ruslando parto de la sendependa kulturo kaj arto estas krude subpremata de la ŝtato kaj eklezio (kiuj en Rusio ĉiam estis komplicoj), estas konate. Mi rememorigas la incidenton kun la feministinoj de la avangardisma muzik- kaj artgrupo „Pussy Riot“, kiuj estis senditaj al lagra prizono por du jaroj, kun la ŭbeno de patriarko Kiril, ĉar ili elpaŝis per provoka kanto en la moskva ĉefpreĝejo. Ankaŭ en la kazo de la prezentado de baletto omaĝe al Rudolf Nureev aperis problemoj, ĉar la fama dancisto estis samsekse-mulo. Ĝia reĝisoro Kiril Serebrennikov estis arestita kaj ne povis partopreni la premieron. Kiel mi legis antaŭ nelonge, la svisa reĝisoro Milo Rau ne plu rajtas vojaĝi al Ruslando, post kiam tie estis montrita lia teatraĵo „Moskvaj procesoj“. Ktp.

organizaĵo de reprezentantoj de la civila socio; ŝajnas, ke ĝi estas agnoskita de la moskva urba registaro kaj de la moskva patriarko.

Pinte al la movado de ĉiuspecaj fundamentalistoj, kiuj sturmas de monatoj kontraŭ tiu filmo, kiujn ili tute ne vidis, staris ankaŭ Natalja Poklonskaja (nask. 1980), deputito de la Dumao kaj konata kiel iama ĉefprokuroro de Krimeo, kie ŝi furoris kiel jura plenumanto de la Kremlo por efektiviĝi ĝian volon kontraŭ ĉio kaj ĉiuj, kiuj oponis la rusan okupacion de la duonsinsulo, kiu apartenas al Ukrainio laŭ la internacia juro⁹ Poklonskaja, kiu estas ĝisosta admiranto de Putin kaj de Nikolao IIa, celas malpermesi la filmon, cetere kun la helpo de la ĝenerala prokuroro Jurij Ĉajka, per konvena decido de la Supera Tribunalo de Ruslando. Poklonskaja, kiu pretendas reprezenti tipe rusajn valorojn kiel „honoron, konsciencon, dignon, fieron, niajn kredon kaj amon al la patrujo“, pritaksis la filmon materialo, kiu ofendas la sentojn de tiuj, kiuj defendas tiujn valorojn. Krom tio, ŝi klopodis pruvi, ke Eidinger estas perversa „pornoaktoro“, montrante koncernajn bildojn de antaŭaj filmoj kun lia partopreno. Por multaj la aktoro fariĝis eĉ satanisto kaj malamiko de rusoj. Kvankam Poklonskaja ne estas sendanĝera politikistino (kiu cetere troviĝas sur la listo de la okcidentaj sankcioj kontraŭ Ruslando), ŝajnas, ke ŝi tamen konas siajn limojn. La perfortan agadon de la „Kristana ŝtato“ ŝi malaprobis kaj la „movadon Sorok sorokov“ ŝi eble subtenas, sen montri tion publike. Cetere, Poklonskaja anoncis, ke ŝi intencas esplori eventualan misuzon de la ŝtata financado de la filmo kaj volas transdoni la aferon krom al la ĝenerala prokuroro ankaŭ al la sekreta servo FSB. Forta tabako! Fakte, Uĉitel (kio cetere signifas instruiston) ricevis monon de la ŝtato: la buĝeto estis 25 milionoj dolaroj, kiuj valoras unu miliardon kaj kvincent milionojn da rubloj. Temas pri unu el la plej multekostaj rusaj filmoj entute. De 814 elspezitaj milionoj rubloj 280 milionoj rubloj venis kiel subteno de la ŝtata fondaĵo por la kinejo, inter alie por financi 5000 kostumojn. Proksimume 2000 homoj kunlaboris en la filmo, kiuj devis esti salajritaj.

Interese: Laŭ telefona enketo de la sociologia instituto VCIOM inter la 18a kaj 19a de oktobro 2017 en tuta Ruslando, la opinion de Poklonskaja reprezentis 17% de la demanditoj, dum 48% rifuzis la ideon malpermesi la filmon kaj 35% ne sciis ion respondi. Precipe en iuj respublikoj kun islama loĝantaro (kiel Inguŝio, Kabardino-Balkario kaj Tatarstano) la prezentado de la filmo estis publike limigita.

Pozicio de Putin & Co.

Malgraŭ profunda skeptiko pri la filmo, nek la eklezio nek la ŝtato aprobas la perforton kontraŭ „Matilda“. Dmitrij Peskov, la oficiala proparolisto de la Kremlo, trovis malbone prijuĝi la filmon laŭ la trejlero kaj rekomendis al la publiko unue spekti ĝin; li diris, la 8an de februaro 2017, tra TASS kĉaj la centraj TV-kanaloj, ke la minacoj „flanke de anonimaj ekstremuloj estas absolute ne akceptebla“ kaj referencis al iu oficiala deklaro de prezidento Putin, kiu kondamnis „vandalismon kaj lezon de la leĝo“. Li aldonis la averton, ke unuflanke la sentoj de kiu ajn ne rajtas esti ofenditaj, aliflanke ne ekzistu provoj premi la kulturon. „Neniu rajtas malpermesi la liberan opinion por esprimi sian pozicion“. Ĉefministro Dmitrij Medvedev alvokis al pacienco kaj rezigno pri agresemo en la sfero de la kulturo. Vladimir Putin, kiu publike esprimis sian estimon por Uĉitel (en ties ĉeesto), kiun li laŭdis kiel „patriotisman“ civitanon kaj „talentitan“ reĝisoron, diris, ke la malpermeso de tiu filmo havus neniun sencon, ĉar vole nevole ĝi disvastiĝos en la lando kaj precipe en la interreto, kiu, kiel konate, estas dorno en la okulo de Putin. La cinika postkomunisma duondiktatoro, kiu estas fifame konata pro siaj malicaj intencoj kontraŭ la opozicio, avertis, ke la homoj en Ruslando reprezentas diversajn opiniojn, gravas, ke la publika socia „dialogo restas kadre de la leĝo“. Ankaŭ Vladimir Medinskij, ministro pri kulturo, kiu estas konata pro tio, ke li prezentis en siaj libroj proprajn versiojn de la historio, estas kontraŭ la ideo subpremi la filmon, kiun li komparis kun „Shakespeare in Love“. Ĉiukaze, li klarigis, ke jura bazo por nuligi la licencon de la rajto montri kaj disvastigi la filmon en kinejoj ne ekzistas.

Interkrampe necesas mencii, ke Uĉitel subskribis en printempo 2014 deklaron de la ruslanda ministerio de la kulturo, kiu estis subskribita de 511 ruslandaj kulturaktivuloj, kiuj esperimis sian subtenon al la pozicio de Putin rilate la traktadon de Ukrainio kaj Krimeo. Evidente la ruslandaj regantoj

⁹ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Natalja_Wladimirowna_Poklonskaja.

alte taksis tiun komplezon, kiun la reĝisoro faris al ili, kio eble helpis, ke ili ne 'persekutis' lian filmon, kion ili eble estus farintaj en alia kazo. Pro tiu subskribo Uĉitel en principo devus troviĝi sur la okcidenta listo de sankciitaj personoj (kiel la kantisto Iosef Kobzon), sed ĝi ja koncernis ĉefe politikistojn.

La 28an de septembro 2017 en la kinejo de GUM en Moskvo okazis nepublika prezentado de la filmo al la membraro de la kulturkomisiono de la ruslanda parlamento (Dumao), kiun ĉeestis ankaŭ kelkaj deputitoj de aliaj komisionoj. La ĉefo de la kultura komisiono Stanislav Govoruhin komunikis, ke al ĉiuj parlamentanoj, kiuj spektis la filmon, ĝi plaĉis. Laŭ lia klarigo, ĉiuj, kun kiuj li parolis, diris, ke ilia rilato al Nikolao IIa iĝis „pli bona ol antaŭe“. Tio koncernas ankaŭ la deputiton Jaroslav Nilov de la frakcio de la ultranaciisma partio LDPR (Ĵirinovskij), kiu diris, ke en la filmo li trovis neniun epizodon, „kiu enhavus iun kriman tendencon“, kio povus lezi la leĝon pri defendi de la religiaj sentoj, Ankaŭ Elena Drapeko, unua vicestro de la komisiono pri kulturo (frakcio „Justa Russio“) alte taksis la filmon kaj diris, ke ŝia sinteno al Nikolao IIa pliboniĝis. Ankaŭ ŝia sampartiano Mihail Emaljanov opinias, ke la filmo estas „rimarkinda“ (r. zameĉatel'nyj) kaj ke por malpermesi ĝin kialo ne ekzistas.

Kvankam la rusa televido ne reklamis la filmon, la registara organo *Rossijskaja gazeta* skribis dekunu tagojn antaŭ la premiero, kiu okazis la 23an de oktobro en la Mariinskij-teatro en Sankt-Peterburgo, ke la arto ne estas devigita respekti la faktojn de la historio kaj pritaksis la filmon fabelo. Pli bone fabelo ol mensogo!

La tendencisma novajorgano *Ruslando hodiaŭ*, kiu estas konsiderata kiel duonoficiala propagandilo de la Kremlo, skribis, probable je la granda miro de la legantoj: „Kiu vidis la filmon, tiu rimarkas, ke la riproĉoj flanke de la rus-ortodoksa eklezio estas harfendaj. La scenoj kun Nikolao en la lito estas simple nur romantikaj. La honoro de la rusa caro ne estas tuŝita. Male, li estas prezentita kiel aminda kaj kelkfoje amuza persono“. Kaj: „Se oni povas fari al la reĝisoro unu riproĉon, tiam ĝi koncernas tion, ke la bildo de la plej lasta caro estas tro bela“, pentrita laŭ triviala romano. La historia rolo, (mal)merito kaj sorto de Nikolao II. kiel gvidanto de sia imperio estas konataj kaj ne devas esti ripetita ĉi tie. Sed la filmo havas nenion komunan kun tiu rolo. Se oni volas serioze diskuti pri la historia vero, certe, en la filmo aperas kelkaj epizodoj, kiuj ŝajnas pli simili al la fantazio ol al la realeco. Sed Uĉitel konfirmis, ke en la filmo ĉiuj historiaj prezentaĵoj estas aŭtentikaj. Li ankaŭ rifuzis la kritikon kontraŭ Eidinger kaj diris, ke li pretas renkontiĝi kun Poklonskaja por pridiskuti kun ŝi la miskomprenojn, kvankam li kaj lia tuta grupo de filmistoj „jam laciĝis por gvidi militon“ kun ŝi. Inter la celoj kaj intencoj de Uĉitel estis montri la dilemon de la baldaŭa caro, kiu amas du virinojn samtempe, pri kiuj li ne scias kiun elekti, kaj doni al tiu caro la 'vizaĝon de homo'. La reĝisoron interesis ankaŭ la demandoj, kiel povis okazi, ke tia virino kiel Matilda Kŝesinskaja povis influi la historion de Ruslando, same kio estus okazinta, se ŝi efektive estus fariĝinta la edzino de la caro. Kiel sciante, Aleksandra fariĝis viktimo de la ĉarlatano Rasputin kaj heredigis al sia filo, la carido Alekseo, la hemofilion. La ĉefa merito de la filmo eble estas ankaŭ, laŭ mi, ke ĝi rememorigis, en la senco de omaĝo, la ekziston kaj sorton de Matilda Kŝesinskaja, kiu famiĝis kiel signifa pola, rusa kaj franca balet-dancistino kaj forgesita stil-ikono de la 20a jarcento sur elstara internacia kulturenivelo. Efektive, la reĝisoro sukcesis fari el Nikolao kaj Matilda tre simpatiajn estaĵojn, trajto, kiu mankas al Alix, kiu aperas kiel ĵaluza, orgojla, superstiĉa persono, kiu strikte defendis la monarkiismon kaj ne kontraŭis la (katastrofan) politikon de sia edzo, konsiderante ĉiujn demokratiajn strebojn kaj rajtojn de la popolo malbonaj kaj superflujaj. Alix kaj Matilda estis du komplete diversaj „virinaj konceptoj“: Alix estis homo de la pasinteco, de la mezepoko, dum Matilda apartenis al la moderna, estonteco. Kvankam ambaŭ ŝatis la lukson, pompon kaj riĉecon.

Ne nur reĝisoro Uĉitel, sed ankaŭ Lars Eidinger kaj la ceteraj aktoroj de „Matilda“ reagis al ĉio tio kun granda bedaŭro, ŝoko, konsterno kaj tristeco pri tiu skandala traktado de sia filmo en Ruslando. Ili suferas, rakontis Uĉitel, ĉar ili amas tiun filmon. Du jarojn Eidinger pasigis en Ruslando por produkti ĝin kaj sentis sin ligita kun la lando, kiun li ne konis antaŭe kaj kiu estis komplete fremda al li kiel okcidenta germano. Pro tio li estis surprizita kaj ne povis kompreni, kial parto de la socio tiel forte atakis la filmon. Ĉar Eidinger timas la fanatikajn homojn, kies malamo kaj kolero konas neniujn limojn kaj kontraŭ li estas tiel fortaj, li rezignis partopreni en la premiero de la filmo en Sankt-Peterburgo, kiel Eidinger komunikis en tre emocia retmesaĝo al Aleksej Uĉitel. Veturi tien estis por li simple tro danĝera risko, ĉar li havas edzinon kaj filinon.

Ĉiuj priskribitaj problemoj, kiuj finfine evidentiĝis kiel ŝaumo kaj fumo, ne trompas la impreson pri arte elstarega majstroverko, kies rusan originalon mi unuafoje vidis en novembro, kiun talentitaj kaj pozitive orientitaj rusoj, germanoj kaj poloj kune produktis. La filmado okazis en la famaj caraj palacoj de Sankt-Peterburgo, inter alie en Carskoe Selo kaj en la palaco de Jusupov. La baletaj scenoj estis filmitaj en la peterburga Mariinskij-teatro. Ĉar la ceremonio de la kronado ne povis okazi en la Uspenskij-katedralo de la Kremlo (pro kaŭzoj de la spaco), ĝi estis filmita en iama armila fabriko, kie la kuliso estis speciale rekonstruita. La Mariinskij-teatro ludis la muzikon de la usona filmkompozitoro Marco Beltrami (nask. 1966), kiu produktis la muzikon por sennombraj aliaj filmoj.

© Andreas Künzli, decembro 2017



Oficiala afiŝo de la filmo, Nikolao en 1891, Nikolao kaj Aleksandra Fjodorovna en 1894.
 sube: Matilda Kŝesinskaja. (Fonto: Vikipedio, Vikimedia). Oni atentu la diferencon de la modo: Mezepokeca ĉe Alix kaj moderna ĉe Matilda.



(Reuzado laŭ Creative Commons Lizenz "CC-BY-SA 3.0", vd. la koncernajn paĝojn en Vikipedio)

Utiligitaj fontoj

<https://www.tagesschau.de/ausland/matilda-film-101.html>

<https://www.tagesanzeiger.ch/kultur/kino/der-heilige-und-seine-ballerina/story/30124450>

<https://www.mdr.de/zeitreise/matilda-kschessinskaja-primaballerina-zarengeliebte100.html>

<http://www.faz.net/aktuell/feuilleton/medien/film-matilda-veraergert-kirche-und-glaeubige-in-russland-15230924.html>

<http://www.zeit.de/2017/42/lars-eidinger-alexej-utschitel-mail-mathilde-bedrohung>

<https://www.shz.de/deutschland-welt/kultur/russisches-historienmaerchen-matilda-kommt-nach-langem-streit-ins-kino-id18122291.html>

<https://deutsch.rt.com/russland/59396-russland-streit-um-auffuehrung-des-films-mathilda>

<http://www.ndr.de/kultur/film/Lars-Eidinger-ueber-Zarenfilm-Mathilde,eidinger102.html>

<https://www.srf.ch/news/international/heiliger-zorn-gegen-matilda>

https://de.wikipedia.org/wiki/Mathilde_-_Liebe_ändert_alles

[https://ru.wikipedia.org/wiki/Матильда_\(фильм,_2017\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Матильда_(фильм,_2017))

https://de.wikipedia.org/wiki/Alexei_Jefimowitsch_Utschitel

https://de.wikipedia.org/wiki/Lars_Eidinger

https://de.wikipedia.org/wiki/Luise_Wolfram

https://en.wikipedia.org/wiki/Michalina_Olszańska

<http://www.theupcoming.co.uk/2016/11/12/i-olga-an-interview-with-actress-michalina-olszanska-and-director-tomas-weinreb>

https://eo.wikipedia.org/wiki/32_fouettés_en_tournant

https://ru.wikipedia.org/wiki/Матильда_Феликсовна_Кшесинская

http://krotov.info/library/11_k/she/sinskaya_0.htm (Ruslingvaj memuaroj de M. Ksesinskaja)

Rusaj resursoj:

<https://www.youtube.com/watch?v=kZhgRPIbUMM> (dokumentita filmkritiko)

<http://www.mk.ru/social/2017/03/19/dnevnik-matildy-kshesinskoy-o-romane-s-cesarevichem-nikolaem-publikuetsya-vpervye.html> (pri la veraj rilatoj inter Nikolao kaj Matilda)

<https://www.youtube.com/watch?v=L84cBo0akEs> (patriarko Kiril)

https://www.youtube.com/watch?v=uAa9V_4ueYo, <https://www.youtube.com/watch?v=M3IU0o8MJNE> (aliaj rus-ortodoksaj ekleziuloj)

https://www.youtube.com/watch?v=F7P8yBKCb_o (Putin kaj Uĉitel)

<https://www.youtube.com/watch?v=rIUrBWymf9c> (Uĉitel)

<https://www.kp.ru/daily/26669.3/3689642> (intervjuo kun Uĉitel)

<https://www.youtube.com/watch?v=BIL3nLSK8hE>, <https://www.youtube.com/watch?v=F0tO0nM6lpw>,

<https://www.kp.ru/daily/26667.5/3689117>, <https://www.kp.ru/daily/26636/3655316> (Poklonskaja)

<https://www.youtube.com/watch?v=V0464OAOQbE> (Poklonskaja kaj Ĵirinovskij)

<https://www.youtube.com/watch?v=pYtWgiPIX2Y>, https://www.youtube.com/watch?v=dXDkwb_pvcz,

https://ru.wikipedia.org/wiki/Отношения_наследника_Николая_и_Матильды_Кшесинской

[https://ru.wikipedia.org/wiki/Сорок_сороков_\(движение\)#Протесты_против_фильма_«Матильда»](https://ru.wikipedia.org/wiki/Сорок_сороков_(движение)#Протесты_против_фильма_«Матильда»),

https://ru.wikipedia.org/wiki/Скандал_вокруг_фильма_«Матильда» (reagoj de diversaj flankoj en Ruslando, movadoj „Sороk sorokov“ kaj „Kristana ŝtato – Sankta Rusio“)

[http://cyclowiki.org/wiki/Христианское_Государство_-_Святая_Русь_\(организация\)](http://cyclowiki.org/wiki/Христианское_Государство_-_Святая_Русь_(организация)) (movado „Kristana ŝtato – Sankta Rusujo“)

[https://ru.wikipedia.org/wiki/Сорок_сороков_\(движение\)](https://ru.wikipedia.org/wiki/Сорок_сороков_(движение)) (movado „Sorok sorokov“)
<http://www.mk.ru/incident/2017/09/20/smi-lidera-khristianskogo-gosudarstva-grozivshego-mestyu-za-matildu-zaderzhali.html>, <http://www.mk.ru/social/2017/09/28/lider-khristianskogo-gosudarstva-kalinin-ubil-sosedku-vmeste-s-narkomanami.html> (arestado de A. Kalinin)
<http://www.mk.ru/social/2017/09/28/lider-khristianskogo-gosudarstva-kalinin-ubil-sosedku-vmeste-s-narkomanami.html> (pri Kalinin)
<https://www.youtube.com/watch?v=2yXBaxF3yWQ> (scenoj de la produkta proceso dum la kronada ceremonio)
<https://www.kp.ru/daily/26667.5/3689117>, <https://www.kp.ru/daily/26636.5/3655602>,
<http://www.mk.ru/social/2017/09/26/rodstvennik-kshesinskoy-prodolzhaet-nastaiivat-na-versii-rozhdeniya-u-nee-dochoeri-ot-carya.html> (Konstntin Severnard pri Celina)
<https://www.youtube.com/watch?v=YEPntRHtWQs> (traktado en la televido)

Деятели культуры России в поддержку позиции Президента по Украине и Крыму:

<https://www.mkrf.ru/press/news/deyateli-kultury-rossii-v-podderzhku-pozitsii-prezidenta-po-ukraine-i-krymu20171009103201>

Aliaj fotoj:

<https://www.novayagazeta.ru/articles/2017/09/16/73864-matilda-kak-istochnik-trezvosti>

<https://www.kp.ru/daily/26737/3765083>

<https://www.kp.ru/daily/26669.3/3689642>

<http://www.mk.ru/social/2017/09/26/rodstvennik-kshesinskoy-prodolzhaet-nastaiivat-na-versii-rozhdeniya-u-nee-dochoeri-ot-carya.html>

<http://www.mk.ru/photo/gallery/12152-198830.html>

Libroj (taglibroj, memuaroj):

<https://www.swissbib.ch/Search/Results?lookfor=Ksesinskaja&type=AllFields&limit=20&sort=relevance>

https://ru.wikipedia.org/wiki/Отношения_наследника_Николая_и_Матильды_Кшесинской#Исторические_источники

Pri la skandalo ĉirkaŭ la grupo „Pussy Riot“:

https://de.wikipedia.org/wiki/Pussy_Riot#Inhaftierung_und_Verfahren_in_erster_Instanz

Pri la baletto „Nureev“:

<http://www.3sat.de/page/?source=/kulturzeit/news/194571/index.html>

<https://www.3sat.de/page/?source=/kulturzeit/news/195847/index.html>

<https://www.br-klassik.de/aktuell/news-kritik/serebrennikov-ballett-nurejew-bolschoi-theater-premiere-100.html>

Pri la teatraĵo de Milo Rau kaj la malpermeso viziti Ruslandon:

http://www.deutschlandfunkkultur.de/buehne-von-der-kunst-beleidigt.954.de.html?dram:article_id=280566

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, decembro 2017

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

This is a non-commercial projet for educational purposes, such as teaching, scholarship and research. In case of problems with copyright, please contact the author.

Pri la reuzado de bildoj el Vikipedio vd.:

<https://de.wikipedia.org/wiki/Wikipedia:Weiternutzung>

<https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Weiterverwendung>